

Frontartikolo

Jen la dua Esperanto-bulteno verkita de nia klubo, sed la 291-a de la longa serio eldonita de la normandaj esperantistoj de la komenco de la pasinta jarcento.

Ĝi raportas pri bonaj kaj malfeliĉaj novaĵoj.

En la antaŭa bulteno, vi legis poemon de Goeto, bele tradukitan de nia amiko **Renato**, kiu **forpasis** en Londono komence de Februaro kaj fariĝis plia verda steleto en la esperantista stelaro. Liaj amikaj kaj spertaj konsiloj mankos al ĉiuj. Ni kondolencas Anna-n kaj la infanojn.

Pli gaje estas raporti pri nia kluba vivo, inviti vin al **mallonga vojaĝo al Estonujo** kun Léa kaj informi vin pri kelkaj **rendevuoj** kaj helpi vin instali **esperantan klavaron por via poŝtelefono**.

*En la lasta paĝo vi trovos informojn pri **infanrakonto de Bernard Clavel** eldonita de nia klubo. Temas pri **la unua traduko al Esperanto de unu el liaj verkoj**.*

Baldaŭ vizitos nin niaj samideanoj Miguel Angel kaj Daimi, el Kubo.

Karaj esperantistoj de la apudaj departementoj, ni varme invitas vin partopreni la diversajn aranĝojn organizitajn tiukaze.

Specialan mesaĝon ni tre baldaŭ sendos al ili pri tiu aranĝo.

Bertrano

Enhavo

Nia kluba vivo tagon post tago	2
Intervjuo de Svitlana Kozarenko el Ukrainujo	3
Kiel tajpi ĉapelitajn literojn per androida telefono? Jen la (simpla) solvo!	4
Ni funebras Renato-n	5
Novaj akademianoj estis elektitaj	5
Normanda esperantita studentino staĝas en Tartu	6 & 7
Kiel fartas la movado en Estonujo?	7
Elstara iama esperantisto estona: Edgar de Wahl, aŭtoro de Okcidentalo ...	8 & 9
Survojaj renkontoj	10
Kongresoj, kursoj kaj staĝoj	10 & 11
Kursoj en Hérouville	11
Helpu nin! Ili estas nia heredaĵo	11

Unuafoje disponeblas en Esperanto verko de Bernard Clavel, eldonita de nia klubo	
Mendu La Kantanta-n Arbo-n en nia libroservo	12




17-an de Januaro: Frateton havas nia ginko.



La 17-an de januaro, kadre de la franca-germana semajno, niaj amikoj de la asocio Hérouville-Garbsen siavice plantis arbon. Ni elektis ginkon. Ili plantis tilion en Parc Central du Bois. Ĉe niaj transrejnaj najbaroj, tia arbo simbolas pacon kaj justecon. Ĉirkaŭ dek el niaj klubanoj ĉeestis la aranĝon, en kiu partoprenis la lernantoj de la najbara lernejo Célestin Freinet, kiuj deklamis poemon kaj kantis en la germana. Kelkaj el ni ankaŭ partoprenis en la germana Poliglota Kafejo ĉe Café des Images kaj spektis la filmon "La Belle Affaire" ("Du kontraŭ unu").

23-an de Januaro: "Legatono" - "Lirathon."



Por festi la plezuron de la legado, la franca nacia librocentro kaj la ministerio pri kulturo ĉiujare organizas la Nuits de la Lecture (Legado-Noktojn). Ĉi-jare, por la 9-a okazo, la fakdepartemento pri fremdaj lingvoj de la Universitato de Renno organizis la 23-an de januaro, de tagmezo ĝis noktomezo la "Lirathon" ("Legatono"). Ĉiu legis tekston en la lingvo, kiun li elektis, en ĉeesto aŭ per reto. Omaĝe al István Nemere, kiu forpasis pasintan novembron, Bertrano legis la unuajn paĝojn de [Sur kampo granita](#), romano origine verkita en Esperanto. Siaflanke Bernard Robineau el Nanto legis la poemon [Tagiĝo](#) de Antoni Grabowski. La kunordiganto asertis, ke esti la unua fojo, ke la partoprenantoj aŭdis tekston en Esperanto.

Poliglota kafejo okazas unufoje monate, merkrede je la fino de posttagmezo en Hérouville Saint-Clair (ĉe la biblioteko François Geindre, ĉe la Café des Images aŭ ĉe CROUS universitata socia centro). En tiu ĉi kunteksto, **merkredon la 12-an de marto**, la klubo Hérouville-Espéranto partoprenis la aranĝon por malkovrigi al ĉiuj nian lingvon, fokusitan tiun vesperon.

Samtempe la Asocio Amitié Hérouville-Garbsen proponis germanan tablon kaj la Tiĥvine Asocio rusan tablon. Ni, por Esperanto, organizis du tablojn: unu por montri kelkajn bazaĵojn de la lingvo uzante tabulludojn (Skrablon,...), la alian por proponi konversaciojn en Esperanto. Sur muro malantaŭ la du tabloj ni projekciis nian retejon por doni pli precizajn informojn pri la agado de la klubo Hérouville-Espéranto. Fine, inter homoj, kiuj interesiĝis sen koni la lingvon, kaj homoj, kiuj jam konis la lingvon, ni parolis kun ĉirkaŭ dek homoj.




fotis Bertrano
Raportas François el Hérouville

Sabaton, la 24-an de Majo en Giberville.

En Giberville, sabaton la 24-an de Majo, okazos la dua Festo de la Marĉoj. Nia klubo partoprenos la aranĝon legante en la franca kaj en Esperanto, malongigitan version de la **Kantanta Arbo**, la libro de Bernard Clavel, kiun ni tradukis kaj eldonis.

Tiuokaze, ni esperas vian viziton!





(Danke al Pasporta Servo, en la lasta semajno de februaro, ni mallonge gastigis Svitlana, ŝian edzon Roman kaj iliajn tri infanojn, Boguslaw, Diana kaj Adelina, el Kievo (Kyïv, Куйв).

Ili vizitis la urbocentron, ĉiĉeronitaj de Gigi kaj la parkon Colline aux Oiseaux (Birda monteto) kun Christian. Ni ankaŭ agrable babilis dum komunan vespermanĝon.

Por iom da tempo, ili planas hejmiĝi en Normandio. Eble ni do revidos unuj la aliajn.



Kiel vi esperantistiĝis en Ukrainio? Klube, rete, okaze de naciaj aŭ internaciaj eventoj, staĝoj, kongresoj...?

Post nia esperantistiĝo en Kijivo (Kyïv, Куйв) por sperti la movadan etoson ni tuj ekveturis al apudmara Esperanto-renkontiĝo "Aroma Jalto" en Krimeo (Crimée, Крим). Tiun belan 10-tagan aranĝon, dum majaj festoj, ni kaj aliaj ukrainaj esperantistoj povis viziti ĉiujare ĝis la anekso de Krimeo. Ankaŭ ni havis ĉiusemajnajn esperanto-klubkunsidojn kaj etajn renkontiĝojn en Kijivo. Foje, ni vizitis aliajn urbojn kiel Odeso (Odessa, Одеса) aŭ Ĥarkovo (Kharkiv, Харків) por partopreni lokajn aranĝojn. De tempo al tempo samideanoj el diversaj landoj vizitis nian urbon; tiam ni partoprenis en komunikado kaj ĉiĉeronado. En 2011, en Kijivo, okazis Internacia Junulara Kongreso en kiu partoprenis multaj eksterlandanoj.

Kiel la infanoj lernis la lingvon? Ĉu nur de vi? Kiel ili praktikas ĝin? (nur en la familio, kun aliaj infanoj?)

Ni neniam instruis Esperanton al niaj infanoj: de sia infaneco, kiam amikoj esperantistoj venis hejmen, niaj gefiloj aŭdis la lingvon kaj po iomete alkiutimiĝis al ĝi. Ni provis en tre eta aĝo organizi renkontojn kun kelkaj esperantistaj familioj kun samaĝaj infanoj sed estis malfacile pro malproksima loĝado unu de aliaj kaj diversaj ritmoj. Ni decidis lasi niajn infanojn elekti mem ĉu ili lernos Esperanton. En 2022, pro la milito mi, Svitlana, venis kun la infanoj en Francio. Ili ĉi tie komencis paroli Esperanton ĉar mi, de tempo al tempo, komunikis kun lokaj esperantistoj kaj partoprenis aranĝojn. Ŝajnas ke la renkontiĝo en kastelo Grenadinoj tre inspiris ilin.

Ĉu laŭ vi kaj laŭ ili helpis al viaj infanoj Esperanto por lerni la francan?

Mi pensas ke tio efikas ambaŭflanke. Kiam homo jam konas iom la francan lingvon tio helpas pli rapide lerni multajn vortojn en Esperanto kaj la kono de la internacia lingvo helpas lerni la francan ĉar estas multaj komunaj radikoj. Tio helpis al infanoj, enplonĝitaj en franca lingvo ĉeestante la francan lernejon.

Kiel fartis la movado en Ukrainio antaŭ la milito? Kaj nun?

Antaŭ la milito nia agado estis sufiĉe aktiva inter aktivaj samideanoj, sed mankis novaj esperantistoj. Estis diversaj Esperanto-renkontiĝoj, ofte en okcidenta apudmontara kaj suda apudmara regionoj. Tamen, ni ne estas tre multaj en Ukrainio. Mi memoras ke, 10 jarojn antaŭe, ni estis proksimume 100 pli malpli aktivaj esperantistoj tra tuta lando.

Nun la movado ne plu estas tre aktiva, tamen, dum tiu milito, esperantistoj subtenas unu la aliajn. Nia Ukraina Esperanto Asocio tradukas, diskutas, agadas, partoprenas en diversaj aranĝoj eksterlande kiam tio eblas. Estas esperantistoj kiuj volontulas, kiuj militservas, kiuj helpas tiujn kiuj bezonas ripari siajn hejmojn post rusatakoj.

Almenaŭ unufoje monate kijivaj esperantistoj kunsidas en iu kafejo kaj interŝanĝas la novaĵojn pri sia vivo, siaj pensoj, siaj sentoj.

De la komenco de la milito, ĉu kaj kiel Esperanto helpis kaj utilis al vi?

Esperanto multe helpis al mi en tiu komplika tempo. Pere de Esperanto mi trovis multajn amikojn, havis etoson por komunikado kaj interŝanĝo. Tio helpadis al mi adaptiĝi al novaj vivkondiĉoj alilande. De la komenco de la milito, multaj esperantistoj el diversaj landoj helpis al mi kaj sendis siajn vortojn de subteno. Mi volas danki al ĉiuj bonkoraj homoj, kiujn mi renkontis en Esperantujo dum tiu milita tempo.


La renkontiĝoj kun esperantistoj ĉiam donas al mi senton de varme amika - eĉ familia - rondo. Mi estas ege bonŝanca ekkoni Esperanton kaj la movadon.

Zamenhof kreis la lingvon kiel vehiklon por paco. Ĉu nur iluzio kiu frakasiĝas kontraŭ la realo?

Tio sufiĉe funkcias en nia Esperanta mondo, sed bedaŭrinde ne ĝenerale sur Tero.

Kiel tajpi ĉapelitajn literojn per androïda telefono? Jen la (simpla) solvo!

4




Votre téléphone est sous Androïd ? Comment installer un clavier en espéranto pout pouvoir taper facilement les lettres accentuées ? C'est très simple !

GBoard est le clavier fourni par défaut sous Androïd. Il est donc probablement déjà installé sur votre téléphone.


Si ce n'est pas le cas, allez sur Google Play, recherchez l'application et installez-la.

Accédez à la page des paramètres de votre téléphone, symbolisée par une roue dentée et suivez le guide...




①

Cliquer sur Clavier et méthodes de saisie.




②

Cliquer sur Gérer les claviers.



③

Cliquer sur Gboard.




④

Cliquer sur Langues.




⑤

Cliquer sur Ajouter un clavier.



⑥

Dans la barre de recherche, saisir Espéranto.




⑦

Dans le bas de l'écran, cliquer sur OKAY



⑧

Le clavier Espéranto est installé.



⑨

Appuyer sur la touche représentant un globe pour passer du clavier français au clavier espéranto sans les lettres inutilisées (q, w, x, y) mais avec les lettres accentuées.



La 1-an de februaro forpasis Renato Corsetti, eble la plej konata homo el ĉiuj aktivaj esperantistoj pro siaj energio, lerteco kaj kuraĝo. Renato estis universalisto, kiu kredis, ke Esperanto estas lingvo por la tuta mondo. Li opiniis, ke Esperanto devas resti simpla, facile lernebla, kaj vere tutmonda – por homoj el ĉiuj landoj kaj ĉiuj opinioj. Li kredis, ke honesta interŝanĝo de ideoj estas la vojo al paco kaj kompreno. Li ĉiam pensis pozitive, kaj kapablis kunlabori kun aliaj parolantoj kaj subtenantoj de Esperanto de ĉiuj kredoj kaj konvinkoj.

Renato naskiĝis en Romo, Italio, en 1941, kaj lernis Esperanton kiel junulo dum la 1960-aj jaroj. Li restis fidela uzanto kaj subtenanto de la lingvo ĝis siaj lastaj tagoj. Mi persone konis lin dum preskaŭ sesdek jaroj. Li estis prezidanto de TEJO, la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo de 1971 ĝis 1973, kaj prezidanto de Universala Esperanto-Asocio (UEA) de 2001 ĝis 2007. Li korespondis kun aktivuloj por Esperanto en ĉiu angulo de la mondo: li subtenis ilian laboron, proponis konsilojn, kaj donis al ili kuraĝon kaj esperon.

Sed li ankaŭ ĝuis Esperanton en la plej simpla senco. Ekzemple, li kunlaboris kun italaj kantistoj por produkti popularajn kaj amuzajn diskojn kun kantoj, kiujn li verkis aŭ tradukis.

Li komencis sian profesion vivon kiel oficisto ĉe banko, sed poste dum multaj jaroj li estis profesoro pri studado de lingvoj kaj la homa menso en la universitato La Sapienza en Romo. Ankoraŭ pli poste, li kaj la brita edzino Anna Löwenstein ekloĝis en Londono, kie li aktivis en la Londona Esperanto-Klubo kaj instruis Esperanton per la reto. Li uzis la reton ankaŭ por kunlabori kun esperantistoj ne nur en Eŭropo,

sed ankaŭ en Azio, en diversaj landoj de Afriko, kaj en aliaj lokoj tra la mondo. Fakte, li fariĝis kvazaŭ tutmonda konsilanto kaj kunlaboranto pri Esperanto-agado. Inter lia ĉefa agado estis fortigo de la studado de Esperanto en universitatoj, precipe en Afriko.

Ni kune laboris je ĉiu punkto en lia Esperanto-vivo – en TEJO, en UEA, kaj en la Akademio de Esperanto. Ni ne ĉiam sam-opiniis, sed ni ĉiam venis al interkonsento: ni sciis vigle diskuti kaj poste bone kunlabori. Fakte, Renato estis mia instruisto pri la arto kunlabori.

Lia forpaso lasos grandan truon. La plej bona maniero por memori lin estas daŭrigi lian laboron kun la sama optimismo, kiun li ĉiam montris en siaj agadoj. Dankon, kara Renato, pro ĉio, kion vi kontribuis. Ni konstruos sur viaj agoj, atingoj kaj bon-kora modelo, por krei pli bonan kaj pli pacan mondon.

Humphrey Tonkin (Usono)
el uea.facila.org

kun permeso de la aŭtoro kaj de la fotisto.

AdE

Renato estis elstara akademiano. Freŝdate okazis voĉdono por

elekti (aŭ reelekti) 17 membrojn de la Akademio de Esperanto.

Li kandidatiĝis por nova mandatperiodo kaj certe estus reelektita. 8 akademianoj estis reelektitaj kaj 9 novaj homoj eniris la Akademion. La novaj membroj estas,

- ĝis 2034: Eckhard Bick (Danio), Cho Sung Ho (Sud Koreio), Gong Xiaofeng (Arko) (Ĉinio), Abel Montagut (Andoro, Hispanio), Jorge Rafael (Rafa) Noguera (Usono), Jukka Pietiläinen (Finlando), Maria Rosaria (Sara) Spanò (Italio), José Antonio Vergara (Ĉilio)
- ĝis 2028: Birke Dockhorn (Germanio).



Universala Esperanto-Asocio

La marta eldono de *Esperanto*, la revuo de UEA, enhavas multajn interesajn artikolojn pri la vivo kaj la verko de Renato Corsetti.

Estonujo estas la plej norda el la tri baltaj landoj. Ĝi havas komunan limon kun Rusio kaj Latvio. Ĝi estas malgranda lando, ĉirkaŭ duoble pli granda ol Normandio sed kun pli ol 2.200 insuloj. Ĝi nombras ĉirkaŭ 1,3 milionojn da loĝantoj. Ĝia ĉefurbo estas Talino.

Ĝi sendependiĝis de Sovetunio en 1991, estas membro de Eŭropa Unio de 2004 kaj uzas Eŭron kiel monon de 2011. Situanta okcidente de la lando, ĉe la rivero Emajõgi, Tartu estas la dua plej granda urbo de Estonio, kun iom malpli ol 100.000 loĝantoj. Ĝi estas ofte rigardata kiel la intelekta kaj kultura centro de la lando. Okazas tie multaj kulturaj eventoj kaj viziteblas belaj muzeoj kaj historiaj konstruaĵoj, kiuj allogas vizitantojn tutmondajn.

La Universitato de Tartu estis fondita en 1632. Ĝi havas historian kampuson kun miksaĵo de klasikismaj kaj modernaj konstruaĵoj. La ĉefa konstruaĵo estas ikono de Tartu, kiu akceptas multajn internaciajn studentojn kadre de diversaj eŭropaj programoj.

En Julio 2024 okazis en la universitato la 58-aj baltaj esperanto tagoj en kiu partoprenis 55 esperantistoj el 13 landoj.

Pasintjare, nia klubo akompanis studentinon el la Universitato de Caen, Léa Pillot--Colin, dum la verkado de ŝia magistra disertacio pri instruado de la franca kiel fremda lingvo pere de Esperanto. Jen resumo.

Esperanto: Ĉu ponto al la franca?

Ĉu Esperanto povus esti ŝlosilo por revoluciigi la fremdlingvan lernadon kaj aparte la francan. Pasintjare, Léa Pillot--Colin, studentino en Magistro de Lingvoscienco ĉe la Universitato de Caen Normandie, esploris la propedeŭtikan valoron de Esperanto kaj ĝian eventualan utilecon en la instruado de la franca kiel fremda lingvo (FLE : Français Langue Étrangère).

Esperanto : lingvo kun Eŭropaj radikoj

Esperanto, multe prunteprenis el eŭropaj lingvoj, precipe el la romanikaj. La internacia lingvo havas do, rilate al morfosintakso kaj fonologio, multajn komunajn aspektojn kiuj similas ilin, aparte la francan.

Tial Léa Pillot--Colin hipotezis, ke Esperanto povus fariĝi efika propedeŭtika rimedo por lernado de la franca kiel fremda lingvo (FLE – Français Langue Étrangère).

Metodologio kaj Rezultoj

Por kontroli tiun hipotezon, ŝi observis kursojn en nia klubo kaj dissendis retajn demandarojn al esperantistoj tra la tuta mondo.

Kombininte klasajn observojn, intervjuojn kaj analizojn de la respondoj kiujn ŝi ricevis, ŝi observis, ke certe Esperanto havas propedeŭtikan valoron sed, nesimetrian.

Esperanto povas faciligi la lernadon de fremdaj lingvoj, sed la avantaĝoj varias laŭ la gepatra lingvo de la lernanto kaj la celata lingvo.

Lernantoj de neromanika deveno (kiel polaj aŭ nederlandaj lingvanoj) raportas, ke Esperanto helpas ilin akiri kapablojn en la franca danke al leksikaj kaj gramatikaj similecoj.

Male, por la franclingvanoj, tiu proksimeco povas kaŭzi erarojn pro konfuzo, precipe en buŝa produktado.

Konkludo kaj Perspektivoj

Esperanto, kvankam ĝi estas rigardata kiel marĝena lingvo ofte ne instruita en lernejoj, povus ludi gravan rolon por helpi la instruadon de fremdaj lingvoj. Pro siaj senesceptaj gramatikaj reguloj, sia nevaria konstruo bazita sur eŭropaj lingvoj, sia unu-al-unu korespondado inter grafemoj kaj fonemoj, Esperanto aperas valora ilo por lingvolernado. Tamen, por maksimumigi ĝian potencialon, estas esence adapti la instruajn metodojn laŭ la gepatraj lingvoj de la lernantoj. Por firmigi siajn konkludojn kaj por pli bone taksii la efikon de Esperanto kiel lernada vehiklo, Léa Pillot--Colin opinias, ke necesus daŭrigi siajn esplorojn per observado de lernantaj grupoj en ĉeesto dum pluraj monatoj, en la kadro de kursoj de FLE kaj kompari la progresojn kaj rezultojn inter grupoj de esperantistoj kaj neesperantistoj.

Konklude, ŝi taksas Esperanton promesa perspektivo por la instruado de fremdaj lingvoj. Per pliaj esploroj kaj pedagogiaj adaptiĝoj, ĝi povus fariĝi valora helpo por faciligi al fremdaj lernantoj lernadon de la franca.

This is (not) the end.



Saluton al ĉiuj,

Mi nomiĝas Léa kaj mi estas 26-jara, mi lernis Esperanton antaŭ preskaŭ 6 jaroj!

Nuntempe, mi estas studento ĉe la Universitato de Caen en Normandio pri lingvistiko.

Mi nun estas en mia lasta studjaro kaj, sekve, mi devis fari staĝon instruante la francan kiel fremdlingvon. Tial mi nun loĝas... en Tartu, Estonio! Malvarma kaj fremda, sed, kiel ĉiam, mi estas preta por nova sperto.

Kaj efektive, Tartu estas tre malsama ol mia kara urbo, Kaeno. Estonoj estas multe pli sindetenemaj kaj silentaj.

La manĝaĵo? Ve! Mi apenaŭ trovas ion kompareblan al tio, kion mi konas en Francio. Do mi povas diri, ke mi malkovras novajn aferojn ĉiutage. Ĉi tie multe neĝis kaj, por la unua fojo en mia vivo, mi spertis temperaturojn de ĉirkaŭ minus dek tri gradoj...

Komence, mi devas konfesi, mi estis tre sola. Mi ne havas amikojn en Estonio, kompreneble, ĝi estas tro malproksima kaj tro malsama lando!

Certe? Ahah, efektive, ne. Kiam mi alvenis, mi renkontis Miĥal en Talino, denove post 5 jaroj. Kaj kia amiko li estas! Ni renkontiĝis en Slovakio, dum mia eŭropa volontula servo en 2019/2020. Miĥal estas la homo, kiu instruis al mi Esperanton. Kaj la sorto faras la aferojn bonaj, ĉar li nun loĝas en Estonio, kiel mi dum la venontaj 5 monatoj.

Do eble Esperanto estas ĉie, ĉu ne? Mi neniam estos sola, eĉ en tia malproksima lando, danke al Esperanto."



Esperanto-Asocio de Estonio (EAE) estas landa organizo de estonaj esperantistoj, fondita la 6-an de Aprilo 1922 en Tartu dum la Unua Kongreso de Estonaj Esperantistoj en kiu partoprenis 409 esperantistojn el 6 lokoj.



Kvankam nia e-movado en Estonio ne estas vigla kiel antaŭe, ni tamen ekzistas. Kluba laboro preskaŭ ne funkcias plu. Nun ni kunigas fortojn ĉefe por Baltaj Esperanto Tagoj. Pasintsomere okazis BET en Tartu. Sed ni volonte akceptas esperantistojn kiuj vizitas nian landon. Mi mem laboras en Talino, sed kelkfoje vizitas ankaŭ Tartu-n. Pri niaj agadoj eblas ricevi informojn el FB grupo Estonaj Esperantistoj.

Tõnu Hirsik

Oni ne scias kun certeco kie naskiĝis, la 11-an de aŭgusto 1867, Edgar von Wahl (poste Edgar de Wahl), ĉu en Olviopol ĉu en la apuda urbeto Bogopol alirande de la rivero Suda Bugo. Tiam ambaŭ rusaj, la du urboj estis kunigitaj en 1919 kun Holta kaj fariĝis la urbo Pervomajsk, hodiaŭ ukraina.

"De mia infanaĝo" — li skribis en la revuo Cosmoglotta (1927), "mi havis la ideon konstrui lingvon". Unue volapukisto, poste esperantisto kaj idisto, li fakte aŭtoris en 1921 propran internacian helplingvon: "Okcidentalo-n" (de 1949 konatan kiel "Interlingue").

Jam de sia infanaĝo, li sciparolis multajn lingvojn: loĝante vintre en Sankt-Peterburgo tiam ĉeforubo de la rusa imperio, kie lia germana-balta familio transloĝiĝis, kaj somere en Estonujo, li denaske parolis tri lingvojn: la rusan, la germanan, la estonan. Li ankaŭ lernis la francan de unu el la servistoj de sia onklo, studis la latinan kaj la grekan en la liceo, la hispanan en la universitato kaj plie lernis poste naŭ aliajn lingvojn.

Abiturientiĝinte en 1886, li komence pripensis studi lingvojn sed, kiam li volis lernadi lingvistikon en la universitato, li trovis la kursojn tiel enuigaj, ke li rezignis kaj elektis studadi arĥitekturon kaj pentrarton en la akademio de arto kaj matematikon kaj fizikon en la universitato por fariĝi mararmea oficiro.

Li diplomiĝis en 1891 kaj nelonge profesiis kiel vicinstruisto antaŭ ol volontuli en la Rusa Mararmeo en 1892. Dum sia militservo, li vojaĝis kaj, inter aliaj lokoj, vizitis la karibajn insulojn kaj Usonon. Komence de 1894 li ricevis la rangon "Michman" (ruse "мичман", france pli malpli sama rango kiel "enseigne de vaisseau de deuxième classe" aŭ "sous-lieutenant") kaj baldaŭ poste retiriĝis. Li estis denove vokita al aktiva servo en la somero de 1904 kaj deĵoris en la Balta Floto ĝis oktobro 1905, sed ne partoprenis la batalojn de la Rusa-Japana Milito.

Fine de la jaro 1887, li aŭskultis prelegon pri Volapuko faritan de kolego de sia patro, la inĝeniero Waldemar Rosenberger (estonta direktoro de la volapuka akademio, poste kreinto de la neŭtrala idiomaĵo). Li trovis la lingvon sufiĉe efika skribe - tiutempe ekzistis 28 gazetoj kaj periodaĵoj en la tuta mondo, inkluzive de Ĉinujo – sed dubis, ke ĝi estu facile uzebla parole. Li tuj vidis la neperfektaĵojn de la lingvo, malfacile lernebla, kun neregula gramatiko kaj konfuzigaj afiksoj tro similaj. Tamen, konvinkita pri la utileco de tutmonda helplingvo, li lernis ĝin, diplomiĝis kiel "tidel volapŭka" (instruisto pri Volapuko) kaj eĉ ekverkadis vortaron pri maraj terminoj.

Sed, en marto 1888, S-ro Schleffer, alia studento en la sama universitato kiel li, pruntedonis al li la ĵus eldonitan libron de Zamenhof "Lingvo Internacia". De Wahl forlasis volapukon kaj fariĝis aktiva propagandisto de la lingvo. Li fondis en 1891 la "Espero-n", la unuan Esperanto-asocion rusan kaj fariĝis korespondanto de la ĵurnalo "La esperantisto". Li korespondadis kun Zamenhof, Grabowski, kaj Richard Henry Geoghegan, la unua esperantisto el la anglalingva mondo. Unu el la liaj unuaj verkoj por Esperanto estis mallonga hispan-esperanta folioleksiko. Sekvis la traduko de "Principio de Mary", romano de Lermontov, eldonita de Zamenhof mem.

Tamen sian entuziasmon por Esperanto li nuancis per kritikoj pri la lingvo. Timante, ke ĝi malsukcesu kiel Volapuko. Li opiniis, ke ĝi devu fariĝi pli natureca kaj pli simila al la naciaj kulturlingvoj, aparte eŭropaj. Li parolis pri la neceso de reformoj kaj proponis al Zamenhof plurajn ŝanĝojn. Ekzemple, li proponis ŝanĝi "tian" (tiama adverbo de tempo) al "tiam" por eviti konfuzon kun la akuzativo de tia kaj forigi la ĉapelitajn literojn. Kun kelkaj el tiuj ŝanĝoj Zamenhof mem konsentis sed aliajn li tute malaprobis. Li tamen eldonis la proponitajn reformojn en la ĵurnalo

"la Esperantisto" kaj proponis baloton por ke la esperantistoj decidu mem pri la reformprojekto, esperante ke ili ne konsentos. Ĉu malaperos la artikolo "la" kaj la akuzativo? Ĉu "-i" fariĝos la finaĵo de la pluralo dum finalo "-en" anstataŭos ĝin en infinitivaj verboj? Ĉu la adjektivoj finiĝos per "-e", same kiel la adverboj? Tiajn ŝanĝojn, kvankam li ne konsideris ilin sufiĉaj, subtenis de Wahl. Sed el la 264 voĉdonantoj, nur 95 aprobis la reformon kiam 157 malakceptis ĝin. Kelkajn jarojn poste, en 1905, okaze de la 1-a universala kongreso, la Bulonja Deklaracio formale kaj definitive malpermesis tian reformon.

Seniluziigita estis de Wahl: "Mi perdis ĉian intereson pri Esperanto (...) kaj (...) komencis miajn proprajn laborojn (1)". Tiuj serĉoj naskis en 1909 unuan version de la lingvo "Occidental" (Okcidentalo), kiu nomiĝis "auli" (akronimo de AUxiliari Lingue International) publikita en la magazino Academia pro Interlingua – Discussiones. En 1911, li eldiris regulon, la "regulon de Wahl", sur kiu baziĝas la vortfarado de Okcidentalo, kiun li oficiale prezentis en 1922 en la revuo, kiun li fondis "Kosmoglott", unue malferma diskutforumo por la reformistoj de la planlingvaj movadoj, kiuj povus tie prezenti siajn proprajn projektojn en siaj propraj lingvoj. La nomo de la gazeto ŝanĝiĝis al "Cosmoglotta" en 1927, kiam ĝi komencis oficiale subteni nur Okcidentalon kaj translokiĝis ekster Estonujon (en Vieno, poste al Helsinko kaj al Svisio) kaj fine fariĝis la oficiala organo de la okcidentala lingvo. De Wahl esperis, ke lia lingvo, bazita sur la regulaj vortoj kaj gramatiko de la okcidenteŭropaj lingvoj, fariĝu la internacia helplingvo, ĉar li kredis, ke ĝiaj natureca bazo kaj facila lernebleco faros ĝin pli alloga por homoj tra la mondo. Li ankaŭ kredis, ke lia lingvo povus evolui nature, kiel faras naturaj lingvoj, kaj ke ĝi povu senprobleme adaptiĝi al la bezonoj de siaj parolantoj.

Neniam populareca kiel Esperanto, Okcidentalo tamen sufiĉe disvolviĝis antaŭ la dua mondmilito. La jaroj de 1935 ĝis 1939 estis precipe aktivaj por "Cosmoglotta" kiu aperigis artikolojn, kiuj pli kaj pli temis pri la lingvo kaj la movado okcidentalaj.

Sed kiam komencis la milito, Okcidentalo, tiel kiel la aliaj planlingvoj estis malpermesita en Germanujo, Aŭstrujo, kaj Ĉeĥoslovakujo; la rilataj asocioj ofte estis devigitaj malfondiĝi. Tio forte bremsis la disvolviĝon de Okcidentalo, kies praktikantoj estis multaj en Germanujo tiutempe. Fakte, nur la okcidentalistoj, kiuj loĝis en Svisujo kaj Svedujo, povis libere uzi kaj propagandi la lingvon.

De Wahl mem, en Talino, ne kapablis komuniki kun aliaj lingvanoj de 1939 ĝis oktobro 1947.

Post la okupo de la urbo fare de la sovetia armeo li estis malliberigita. Lia domo komplete forbruliĝis pro bombardado. Estis detruitaj lia riĉa biblioteko kaj lia arĥivkolekto, ĉiuj liaj verkoj kaj notoj. Perdiĝis multaj neanstataŭeblaj kaj unikaj materialoj.

Post la invado de la naziaj trupoj en 1941, rifuzinte translokiĝon al Germanio, De Wahl estis enkarcerigita. Por savi lin, liaj amikoj lasis proklami lin mense malsana.

En la jaro 1944, li eniris sanatorion Seewald apud Talino kaj restis tie ankaŭ post la milito, ne havante propran loĝejon.

En 1945, li apenaŭ ne estis deportita en Rusion, lasita en tiu psikiatria hospitalo kie li mortis la 9-an de marto 1948 en Talino kie li estis entombigita ĝis 1996, kiam liaj restaĵoj estis translokitaj en la familian tombejon de la kastelo Pajusi.

Preskaŭ malaperis la lingvo, kvankam ĝi freŝdate iomete revigliĝis danke al interreto, kie estas troveblaj la ciferecigitaj arĥivoj de "Cosmoglotta", kelkaj kursoj kaj multe da informoj pri de Wahl.

Ĉu ni renkontiĝos survoje?

De kiam ni emeritiĝis, ĉiusomere, ni kutimas bicikladi dum 2 ĝis 4 monatoj tra Eŭropo kaj raporti pri niaj vojaĝoj kaj esperantistaj renkontoj en [nia blogo "TraEsterantujo"](#).

Ĉi-jare, pro familiaj kialoj, ni ne planas longdistancon vojaĝon kiel kutime. Tamen, ni ne rustiĝu!

Ni do decidis vojaĝi en Normandujo kaj en Bretonujo fine de Junio kaj komence de Julio.

Tiuokaze, **ni ĝojus renkonti aliajn esperantistojn survoje**. Jam kelkaj renkontoj estas planitaj sed jen kelkaj etapoj dum kiuj ni ankoraŭ ne rendevuis.

Estus granda plezuro babili aŭ trinki glason kun konataj aŭ nekonataj samideanoj!

Jen la eblaj rendevuoj:

- la **20-an** de **Junio** en **Quinéville**,
- la **23-an** en **Gouville**,
- la **24-an** en **Saint-Pair-sur-Mer**,
- la **25-an** en **Pontorson**,
- la **28-an** en **La-Chapelle-aux-Filtzméens** (apud Combourg),
- la **29-an** en **Trans-la-Forêt** (inter Combourg kaj Pontorson),
- la **30-an** en **Saint-Aubin-du-Cormier**,
- la **1-an** de **Julio** en **Les-Loges-Marchis** (apud Saint-Hilaire-du-Harcouët),
- la **3-an** en **La-Chapelle-Biche** (apud Flers)
- kaj la **4-an** en **Le Vey**.

Ni esperas vin renkonti.

Ĝis baldaŭ!

Kontakto

 Biciklado.2025@gmx.fr

Kongresoj kaj staĝoj.



De la 23-a ĝis la 27-a de Majo : 77-a kongreso de SAT-Amikaro

La 77-a kongreso de SAT-Amikaro okazos ĉe A.D.E.P.P.A., Avenue Charlemagne, en Vigy, proksime de Metz kaj Thionville.

Vizitoj, libroservo, laborkunvenoj, kursoj, ekzamenoj, prelegoj, retaj kunvenoj kun afrikaj samideanoj, koncerto de la ĥoro "Les Voix de l'Est" kaj de la revolucia koruso.

<https://www.sat-amikaro.org/notre-congres-23-au-27-mai-2025>



De la 7-a ĝis la 9-a de Junio, en Nanto okazos la kongreso de Espéranto-France.

Pri la temo vojaĝoj estos proponite trovi Jules Verne, kiu estis aktiva subtenanto de Esperanto, kaj lerni pli pri la aventuroj de Lucien Péraire, kiu travojaĝis la mondon bicikle dum kvar jaroj danke al Esperanto kaj verkis la libron "Tra la mondo per biciklo kaj per Esperanto", kiu disponeblas en nia biblioteko (BIO -.- PER-067).

<https://kongreso2025.esperanto-france.org/>

De lundo, 30-a de junio ĝis ĵaŭdo, 10-a de julio 2025

9-a Maratona Esperanto-kursaro.

- Kurso por komencantoj kaj komencintoj (A1-A2): Frank Lappe (Germanujo)
- Duagrada kurso (B1-B2): Nedeljka Ložajić (Serbujo)
- Triagrada Kurso (C1-C2): Dennis Keefe (Usono, Ĉinujo, Hispanujo)



<https://gresillon.org/article293.html>



**24 & 25
août 2025**

Invités **Pŝemek de Białystok** (la ville natale de Zamenhof, Pologne), **Ewa Grochowska**, plusieurs fois couronnée pour ses nouvelles par UEA, **Françoise Noireau** et **Chantal Allen**.

Au programme : cours tous niveaux, conférences, jeux de société en espéranto, tourisme... et bien plus !

Participation : 30 € (10 € pour le samedi et 20 € pour le dimanche, buffet compris).

contact : reyssetplouezec@hotmail.com - 07 83 10 83 68

http://www.pluezek-esperanto.net/estivales_2025_o.html



Rejoignez-nous !

Nos cours se déroulent tous les mardis (hors vacances scolaires) de 17 h 30 à 19 h 00 à la Maison des Associations : 10.18 Le Grand Parc à Hérouville Saint-Clair

Si vous ne pouvez pas nous rejoindre, vous pouvez participer au **cours en ligne gratuit I-Kurso**. Un **correcteur** vous sera attribué pour accompagner votre progression au cours des **10 leçons** que vous suivrez à **votre rythme**.

Renseignements : esperanto.herouville.14200@gmail.com

HELPU NIN: ILI ESTAS NIA HEREDAĴO!



Jam komence de la pasinta jarcento, estis eldonita en Rueno normanda esperanta bulteno, kiu tiam nomiĝis "Normanda Stelo". Poste aperis nia "Normanda Esperanto-Bulteno", kies 291-an numeron vi legas. La retrovitajn antaŭajn bultenojn ni ciferecigis kaj enretigis. Vi povas libere legi kaj elŝuti ilin.

Mankas :

- **Normanda Stelo: antaŭ Februaro 1912, Marto, Aprilo kaj Majo 1912, post Aŭgusto 1914 (sed ĉu Normanda Stelo aperis dum la milito?)**
- **Normanda Esperanto-Bulteno : n-roj 1 ĝis 37, 40, 41, 44, 45, 47, 54, 63, 70 à 73, 76, 77, 82 ĝis 85, 131, 181.**

Se vi konservas unu aŭ kelkajn el ili en iu polvera biblioteko, en iu malfacile atingebla subtegmento aŭ en iu humida kelo... Bonvolu kontakti nin. Ni ciferecigos ilin kaj kompletigos la kolekton por ke ili estu savitaj, ke ĉiuj povu legi ilin, kaj ke nia komuna historio ne pereu.

<https://bit.ly/NB-Kolekto>



Ĵus eldonita de nia klubo, jam printempas en nia libroservo

LA KANTANTA ARBO.

<https://bit.ly/HE-libroservo>





Foto: privata kolekto

Bernard Clavel, naskiĝis en 1923 en Lons-le-Saunier (Ĵuraso) kaj mortis en Chambéry (Savojo), en 2010. Popola kaj populara verkisto, li gajnis la 1968-datitan Premion Goncourt per sia romano *Les Fruits de l'hiver* (La fruktoj de l' vintro) kaj poste fariĝis la posteulo de Jean Giono en la Goncourt-akademio. Li estis ankaŭ poeto, eseisto, scenaristo kaj pentristo.

Humanisto kaj nelacigebla aktivulo por pacifismo kaj respekto al la naturo, li ankaŭ verkis por la infanoj al kiuj li klopodis heredigi siajn valorojn. Ĝis nun, neniu verko de Clavel estis esperantigita. Josette Pratte, lia vidvino, afable rajtigis nin traduki kaj eldoni *L'Arbre qui Chante*. Ĝi estas la unua libro por infanoj, kiun li verkis en 1967.



5€

+ sendokostoj: Francio 3,00 €; Aliaj landoj 4,50 €

Isabelle kaj Gérard vivas laŭ la ritmo de la sezonoj, en la dometo de siaj geavoj, for de la vilaĝo, proksime de la arbaro ĉe la piedo de la ĵurasa monto.

Apud la domo estas iu acero de du jaroj mortinta.

lun vintran matenon, stranga homo vizitas la familion. Li estas Paĉjo Vincendon, malnova amiko de la avo.


Parolante pri la arbo, li pledas por ke la avo ne dehaku ĝin: "ĝi ne estas morta, mi kantigos ĝin", li asertas al la geavoj. "Vi vidos, ĝi kantos eĉ pli bone ol kiam ĝi havis siajn brakojn plenaj je birdoj", li promesas al la infanoj.

Ĉu vere? Kiel do kantus arbo kaj kiel faros Paĉjo Vincendon? Ĉu li estus sorĉisto?

En la lastaj paĝoj, la leganto malkovros, la sekreton de Patro Vincendon.

32 paĝoj ilustritaj de Yanpetro Kavlan - formato A5 - ISBN 978-2-9599130-0-6 - Eld. Hérouville-Espéranto

Kiel mendi kaj pagi?



Prefereble mendu ĉe la retejo Hello-Asso, alklaku tiun ĉi ligilon: <https://bit.ly/HE-libroservo> kaj pagu per bankokarto



aŭ mendu ĉe Bertrand Verstraete, esperanto.herouville.14200@gmail.com, 1 rue du Centre, F-14730 Giberville kaj pagu per ĉeko je la nomo de Hérouville-Espéranto.

Atentu: ne forgesu la sendokostojn. Francio 3,00 €, aliaj landoj 5,00 €.